


La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

ĵaŭdon, la 27-an de Junio, 2013 • numero du

Kio okazos hodiaŭ?

- ★ 7:30 – 8:15 atm
Matenmanĝo / Breakfast
Belk Dining Hall (n-ro 13
sur la mapo)
- ★ 8:30 – 9:30 atm
**Grupa kunsido: ĉiuj
klasoj kune /**
Group meeting: all classes together
Flowe Building, ĉambro 110
- ★ 9:30 atm – tagmezo
Lecionoj (meza kaj supera niveloj)
Classes (intermediate and advanced)
Flowe, unua etaĝo
- ★ 10:00 atm – tagmezo
Leciono, postbaza nivelo
Class for post-beginners
Flowe 110
- ★ 12:15 – 1:00 ptm
Tagmanĝo / Lunch
Belk Dining Hall
- ★ 1:00 – 1:30 ptm
Mallonga leciono, post-baza nivelo /
Short lesson, post-beginner level
Flowe, unua etaĝo
- ★ 3:00 – 4:00 ptm
Leciono, supera nivelo /
Class for advanced students
Flowe, unua etaĝo
- ★ 5:45 – 6:30 ptm: **Vespermanĝo**
- ★ 7:00 – 8:00 ptm
Francisko prezentas Go-ludon
Flowe, unua etaĝo



La NASKa Fasko

Redaktejo: Finley 112
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro. Trovu ĝin matene sub via pordo aŭ en la komuna ĉambro ĉe la unua etaĝo de nia loĝejo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 112, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

Salutmesaĝo de Derek ROFF

Derek estas plurjara veterano de NASK kiu ĉi-jare instruas en la meznivela kurso. Jen li prezentas iom da biografia informo por tiuj, kiuj ne jam konas lin.

Kiel multaj usonanoj, mi havis malmultan kontakton kun ne-anglaj lingvoj dum mia juneco. Mi studis la hispanan en mezlernejo kaj liceo, sed neniam sukcesis lerni sufiĉe por uzi ĝin, eĉ en baza maniero. Pro tio, studado de Esperanto estis granda ĝojo, kaj kontrasto al miaj antaŭaj spertoj pri lingvoj. Mi havis la bonŝancon studi ĉe la tiama versio de NASK, kun Grant GOODALL, Duncan CHARTERS, Claude PIRON, John WELLS, kaj pluraj aliaj, kiuj profunde inspiris min. NASK, kaj tiuj profesoroj, logis min revenadi al 14 someraj NASK-programoj, kaj Cathy SCHULZE invitis min instrui tri fojojn.

Paralele, mi restudis la hispanan, kaj sukcesis ekuzi ĝin, eble parte pro mia sperto pri Esperanto. Same pri la portugala kaj la franca, kiujn mi ne studis antaŭe. Mi trovis ĝojon en la studado de lingvoj, kaj sekvis kursojn ankaŭ en la ĉina, japana, rusa, germana, itala, kaj



usona signolingvo, kvankam mi neniam regis tiujn. Tio gvidis min al kariero en la Universitato de Nova Meksiko, kie mi prizorgis la teknikaĵojn, kaj helpis la profesorojn krei lern-materialojn, en la Lingvo-Lerna Centro, dum pli ol dudek jaroj.

Antaŭ du jaroj mi emeritiĝis, kaj nun aktivas kiel vic-prezidanto de la fonduso *Esperantic Studies Foundation*. Mi tre interesiĝas pri natura konstruado, ekologio, permakulturo, kaj renovigeblaj fontoj de energio. Kiam mi havas tempon, mi ŝatas prilabori lignon, kreante meblojn kaj ornamaĵojn.


Mi antaŭĝuas la nunan kuniĝon de NASK, kaj atendas trovi multajn novajn amikojn en nia rondo. Mi esperas ke vi multe ĝuos nian tempon kune, kaj se tio estos la komenco de nova ŝtupo en via interkultura vivo, des pli bone. Bonvenon al nia kune kreata versio de Esperantujo.

Ludu goon kun ni!

Goo (ĉine, 碁) estas tre malnova ludo el orienta Azio kiu nuntempe furoras en diversaj landoj.

La reguloj estas simplaj, sed la ludo mem estas tre profunda. Malkiel ŝako, kie la tabulo malpleniĝas kaj la ludo simpliĝas dum ludado, en goo, la tabulo daŭre pleniĝas.

Venu al la unua etaĝo de Flowe (kie okazas viaj kursoj) **je la 7-a horo ptm**, kiam Francisko parolos al ni pri la historio kaj kultura signifo de goo, kaj poste ni ekscios kiel ludi ĝin!



Konsiloj por novaj NASK-anoj

Same kiel Derek, Lee MILLER ("Liĉjo") estas multjara veterano de NASK. Li jam laboris kiel redaktisto, helpinstruisto kaj poste instruisto. Ĉi-jare li instruas en la post-baza kurso.

Mi volas varme bonvenigi vin ĉiujn en historiĉa Raleigh, Norda Karolino, por NASK 2013. Ni feliĉas pri la granda grupo de partoprenantoj! Multaj homoj revenas de jaro al jaro, kaj multaj homoj venas la unuan fojon ĉiujare, sed ĉiam tuj estiĝas bela komunumo de homoj kiuj volas lerni kaj uzi Esperanton.

Mi estas la instruisto de la post-baza kurso. Mi estas usonano kaj loĝas en la mez-usona ŝtato Misurio. Mi eklernis Esperanton kiam mi havis 16 jaroj... t.e., antaŭ multaj jaroj! Mi unue spertis NASK-on en 2000, tiam en San-Francisko, kaj ĝis nun la kursaro restas grava parto de mia vivo.

Ni havos ok tagojn de lecionoj, programoj, ekskursoj, kaj neformala babilado kaj interago. Mi volas averti vin, ke ne estas multe! La ok tagoj rapide forpasos. Tial estas grave ekde la unua momento pensi kiel plej bone profiti de la tempo. Mi donu al vi kelkajn konsilojn...

- Unue, parolu. Eble vi estas timema, eble vi ne tre bone parolas Esperanton... tamen! Oni lernas paroli per parolado. Vi rajtas resti silenta, kompreneble. Neniu devigos vin paroli se vi ne volas. Sed ĉi tie estas multaj aliaj homoj kiuj same lernas Esperanton, kiuj same ne scias multon. Kaj estas multaj spertuloj kiuj povas helpi kaj kuraĝigi vin. Parolu, parolu en Esperanto, ne ĉiam eskapu al via denaska lingvo. Mi garantias ke se vi komencos paroli Esperanton en la unua tago, en la lasta tago vi parolos multe pli bone.
- Due, ne timu erarojn. Neniu lernas alian lingvon sen eraroj. Ĉiu eraro, ĉu parola aŭ skriba, estas bonega ŝanco plibonigi vian lingvokapablon. Ju pli da eraroj, des pli bone! Eĉ viaj instruistoj eraras, ĉar ĉiu el ni estas lernanto de la lingvo.
- Trie, se vi ne komprenas ion, bv. diri "Mi ne komprenas". Estas facile "jesi" per la kapo kaj ŝajnigi ke vi ĉion komprenas, sed estas certe ke se vi ne komprenas ion, ankaŭ aliaj ne komprenas same. Multe pli bone peti klarigon, ol resti sen klara ideo pri io. Mi sufiĉe ofte diros "Ĉu vi komprenas?" kaj estas tute en ordo honeste diri "Ne, mi ne komprenas".
- Kvare, se io ne iras bone por vi, se vi havas problemon, aŭ se vi estas nekontenta pri iu parto de la kursaro, bv. paroli al iu el la teamo kaj ni provos helpi vin. Ni ne volas ke vi estu malfeliĉa la tutan tempon, kaj multe preferus scii frue se estas ia problemo.

Nu, ek al la lecionoj kaj la diversaj NASK-spertoj. Ĝuu viajn tagojn ĉi tie, amikiĝu kun novaj homoj, kaj partoprenu ĉion, kion vi volas. Kaj mi esperas ke en la lasta tago vi jam komencos pensi pri NASK 2014.



I want to warmly welcome you to historic Raleigh, North Carolina for NASK 2013. We are pleased with the large group of participants! Many people return to NASK year after year, and many people come for the first time each year. Regardless, there's always an immediate community of people who want to learn and use Esperanto.

I'm the teacher for the post-beginner class. I'm from the U.S. and live in the Midwestern state Missouri. I learned Esperanto when I was sixteen years old... that is, many years ago! My first experience with

NASK was in 2000, at that time in San Francisco, and it has remained an important part of my life since then.

We will have eight days of classes, programs, excursions, and informal conversation and interaction. I want to warn you that eight days is not very much! They will pass by quickly, and it's important from the first moment to think about how to best profit from your time. Let me give you some suggestions...

- First, speak. Perhaps you're timid, perhaps you don't speak Esperanto very well... Nevertheless! You learn to speak by speaking. Of course you can stay silent. No one is going to force you to speak if you don't want to. But there are many other people here who are also learning Esperanto who also don't know a lot. And there are many experts here who can help and encourage you. Speak, speak in Esperanto, don't always escape to your first language. I can guarantee that if you will begin to speak Esperanto the first day, by the last day you will speak it much better.
- Second, don't be afraid of mistakes. No one learns a new language without errors. Each error, whether in speech or in writing, is a great chance to improve your language ability. The more errors, the better! Even your faculty make mistakes, because we are all learning the language.
- Third, if you don't understand something, please say "I don't understand". It's easy to shake your head "yes" and look like you understand, but it's certain that if there's something you don't understand, someone else doesn't understand the same thing. It's much better to ask for clarification than to be stuck without a clear idea about something. I will regularly ask "Do you understand?" and it's perfectly fine to honestly say "No, I don't understand".
- Fourth, if something isn't going well for you, if you're having a problem, or if you're unhappy about some part of the program, please speak to one of the team and we will do our best to help you. We don't want you to be unhappy the whole time here, and would much prefer to know early if there's a problem.

Well, off to classes and all the experiences of NASK. Enjoy your days here, make friends with new people, and get involved in everything you want to. And I hope that on the last day you'll have already started thinking about NASK 2014.